- AEIOU-Cirkulero, n-ro 3, 1997-04, 2 p.
- Esperanto finfine egalrajta kun la aliaj lingvoj; 4-paĝa flugfolio de: Jannic (tiele!) Gicquel
- Ĉu nia alfabeto tute taŭgas?; artikolo de: André Albault; en: *HdE* 1944, 1997-11, p. 1
- Albault malpravas; legantoletero de: Alberto Fernández; en: *HdE* 1947, 1997-12, p. 4
- Fonetika analizo de esperanto. Propono por metologio; artikolo de: Daniele Vitali; en: *Literatura Foiro* 170, 1997-12, p. 314–324.
- „Fajfe mi esperas, ke vi ne plu makulos vian gazeton per tiaj stultaj artikoloj pri ortografia reformo![\_]“; legantoletero de: Jak LePuil; en: *La Gazeto* 72, 1997-10, p. 4.
- *La Gazeto* 74 de 1998-01 estas prialfabeta numero: Ho! Niay chapeloy... (Eugène de Zilah, p. 3–5), Alfabeto... (André Albault, p. 6), Kaj alfabeto... (Yannic Gicquel, p. 6), Eseo pri la Esperantaj help-alfabetoj (André Albault, p. 20–25).
- *La Gazeto* 76 de 1998-04: Helpalfabeto (E. de Zilah, p. 3–6), Helpalfabeto: debato (Jean Doublet, Alain Favre, Éric Laubacher, Pejno Simono, Johano-Luko Tortel, Eduard V. Tvarozek, Bernard Aunis, André Albault, p. 10–19).
- Albeaufront; en: *HdE* 1958, 1998-10, p. 1
- Renkonto kun la aliulo; en: *HdE* 1958, 1998-10, p. 2

[*Red.*: Okaze de Unitario, Golden preferas citi sin mem, ol la pritraktitan Unitarian fonton. Albault en sia artikolo „Eseo...“ pretendas kompletecon, sed ne mencias Novon nek NP-on.]

*Red.*: Novo kaj Nova Provo komprenas sin kiel centralon de proponoj, provoj, projektoj kaj protestoj rilate al Esperanto, la ellaborado de esperantidoj aŭ aliaj lingvoj internaciaj. Bonvolu informi nin pri materialo aperinta aliloke pri ni aŭ pri nia afero. Koran dankon!

### Neologismoj de Richard Stahl kun Plena Listo det Prepozicioj

**ab.** Prep., kiu estas la kontrawo det la prep. „gxis“. Noto: La prep. „de“ estas la kontrawo det la prep. „al“; „fo“ estas la kontrawo det „an“ kaj -n; „va“ estas la kontrawo det „av“; „zu“ estas la kontrawo det „ut“.

**af.** Prep. montranta an subjekta suplemento det netransitiva verbo-subst. (ntr-verbo-anto). Ekz.: *La dorm(ad)o af mi. Mi estas dormanto.* Noto: Ne konfuzu kun la prep. „fa“, kiu montras an aganto det tr-verbo-modalo, an *faranto*, an *fabrikanto*.

**-af/i.** (tr) Suf., kiu sxangxas an ntr verbo zu tr verbo. Ekz.: *eksplođafi* = fari aw kawzi an eksplodo. *Kiu eksplodafis an la bombo?*

**ak.** Partikulo montranta an vorto, kiu apartenas al akuzativo. Ekz.: *Sub la cielo* (tiele!) *oni pendigis an tiu kanajlo* (kun komplico) *je piedoj ak la kapo(j) va infre.* Tio cxi signifas, ke la kapo(j) estas parto det la akuzativo (kaj la komplemento), kaj „va“ montras, ke la kapo(j) estas en direkto al infre.

**amb/i** = piediri.

**an.** Prep. montranta an akuzativo (p. 34-35 k 63), krome yi anstatawas „en ... n“ (p. 35).

**ans.** Vd. p. 83 (NP 10).

**ap.** Partikulo montranta an vorto, kiu apartenas al la subjekto. Ekz.: *Li falis ap la kapo an infre. Li falis ap la manoj an sur la planko. Cxio transturnigxis ap la fundo va supre.*

**-ap/i.** (ntr) Suf., kiu sxangxas an tr (ag-) verbo zu ntr (ag-)verbo. Noto: Ne konfuzu kun mediala vocxo nek kun pasiva vocxo. Ekz.: *La akvo movapas en rivero. La suno levapas en esteo. La suno senkapas en vestro. La kamiono skuapas sur aspra sxoseo. Pluvi / La vintro / La tago / Negxi komencapas, finapas, komencapis, finapis.*

**av.** Prep. montranta an direkto de antaw, de en, de derer. Gxi montras, ke la subjekto distigxas de la komplemento kaj la irado komencigxis antaw, en aw derer la komplemento. Ekz.: *Li iras av la gxardeno.* Tio signifas, ke li komencis iri antaw, en aw derer la gxardeno. Noto: La kontrawo de „va“.

**-az/o.** Suf., kiu indikas an momenta aspekto, kaj unuopa ago.

**ba-** Pref. Vd. p. 75 (NP 9).

**ce-** Pref. Vd. p. 83 (NP 10).

**cis** = maltrans.

**cu.** Liganta vorto, kiu ligas an predikativo al subjekto.

**derer** = malantaw.

**des.** Prep. montranta an genitivo (p. 34, 54 k 63). Prep. „de“ restu por ablativa kazo, „des“ estu por poseda kazo (p. 15 k 34).

**det.** Prep. esprimanta an mezura k.s. suplementoj (p. 34) kaj an rilato.

**dez-** Pref. montranta an senigo.

**dist/a** = malproksima.

**-en/oj.** Suf. Vd. p. 83 (NP 10).

**ener.** Prep. signifanta: uzante an energio de. „Ener“ montras an forto, an energio, an povo uzata por efektivi an io. Ekz.: *Ventmuelilo = muelilo ener vento. Benzinmotoro = motoro ener benzino. Mi rompis an sxtono ener (muskoloj det) manoj per martelo. Navigacii ener vento per velo. Plugi ener cxevalo per plugilo. Senpolvigi ener elektro per polvosucxilo. Mi muelas an greno per muelilo ener vento/akvofalo/elektro. Mi kuiras sur fornelo ener gaso.*

**-eni/o.** Pseudosuf. Vd. p. 83 (NP 10).

**-es/a.** Suf. Vd. p. 84 (NP 10).

**este/o** = oriento, eosto.

**fa.** Prep. Vd. p. 15, 20, 34, 54, 63 k 70.

**finim.** Adverbo montranta, ke post longa atendado okazis bona io.

**fo.** Prep. (p.p. mova adjekto), kiu montras an la foriro de la atingita loko kaj estas la kontrawo det la prep. „an“ kaj la finayo -n. Ekz.: *Mi metis (an la libro) an sur la tablo. Mi prenis (an la libro) fo sur la tablo. Mi grimpis an sur la arbo. Mi sobgrimpis fo sur la arbo. Li iras fo Berlino / fo hejme / fo inter ni.*

**graw.** Signifas: atentante an influo de.

**-if/i.** (tr) Suf., kiu montras, ke oni faras an substantivo ut la vorto. Kp. kun -ip/i.

**im.** Prep. montranta an iu, aw an io, kiu ordonis, imosis an (ia) ago; = law ordono det. Ekz.: *Mi servas en militistaro im la sxtato. Mi prenas an la medikamento im la kuracisto. Mi funkcias im la estro. Mi pagas an la imposto im la diktaturo / an dismo im eklezio.*

**infir** = malsuper.

**ins.** Prep., kiu estas la malo de „el“.

**-ip/i.** Suf. Vd. p. 84 (NP 10).

**it.** Prep. montranta an materialo. Kiam temas pri instrumento oni devas uzi an la prep. „per“. La prep. estas el Germaneza „mit“ kaj Angleza „with“. Ekz.: *Mi malenas an la vando it farbo per broso (aw per rulo). Mi nutras an mi it legomo per forko kaj per kutelo. It kio vivas homo? It nutrenzo.*

**-izm/o.** Suf. montranta an toksigxo ka substanco.

**jo ... to** = ju ... des (p. 15). (Vd. „des“.)

**ka.** Prep. montranta an la kawzo.

**ko-** Pref. signifanta „kune“.

**koram.** Prep. montranta an cxeesto fa iu.

**ku.** Liganta vorto montranta an objekta predikativo.

**kual.** Liganta vorto, kiu montras an kvalita (funkcia, stata, destineca) objekta identiga adjekto kaj montras an kondicxa objekta identiga adjekto. Gxi ligas an kvalifika identiga adjekto al gxia objekto, kaj ligas an kondicxa identiga adjekto al gxia objekto. Gxi estu anstataw kvalifika kaj kondicxa „kiel“. Ekz.: *Mi mangxis an kuko kual pano. La E-istaro agnosku an mi kual neologismemulo.*

**loc** montras en loko det.

**losi** = malgajni. Ekz.: (ntr) *Mi losis en la loterio.* (tr) *Mi losis an la mono.*

**lu.** Prep. montranta an influo aw io influa.

**-n.** Suf. kolokviale montranta an objekta (akuzativa) suplemento. Ekz.: *Mi sxatas la legadon an libro kun neologismoj* (p. 34).

**-oc/a.** Suf. Vd. p. 84 (NP 10).

**pa-** Pref., kiu sxangxas an aktiva vocxo zu pasiva vocxo. Oni povas legi en PAGo, ke an la aktiva vocxo oni esprimas per simplaj tempoj det verboj, sed an la pasiva vocxo oni devas esprimi per kompleksaj tempoj, t.e. per pasiva participo kaj per la verbo

„esti”. Ekz.: *Mi mangxas an la tagmangxo. La tagmangxo estas mangxata.* La akuzativa objekto farigxas akuzativa subjekto. La akuzativa subjekto estas frazelemento, kiu pree estis akuzativa objekto.

En E. mankas simplaj formoj por pasiva vocxo. Se oni aplikus an „pa-“ al verbo, ekz. *pamangxas*, oni havus an simplaj formoj por pasiva vocxo. Ekz.: *Mi mangxas an la tagmangxo. La tagmangxo pamangxas.* „Pamangxas” montrus, ke la subjekto estas akuzativa, aw ke la subjekto estis akuzativo. Sekve la pref. „pa-“ povus farigxi akuzativa prep. Ekz.: *Mi mangxas pa la tagmangxo. Mi iras pa Parizo. La vojo pa Parizo. Li estas alta pa du metroj.* Tamen, „an” estas (la) plej bona akuzativa prep. Oni ne povas uzi an „pe” por cxi tiu afero, cxar „pe” jam montras an la perfektivo, fina aspekto. Ekz.: *Mi pemangxis an la tagmangxo.* An kio diras la PAGO? „Nur unika sufikso (aw prefikso), montranta sole la pasivecon estus povinta enradikigxi”. Do, se sufikso povus fari an tio, ankaw prefikso povus fari an tio. [Red.: *Kp. kun la rumana prep. pe.* Ekz.: *pe mine (min), pe noi (nin), pe voi (vin), pe sine (sin), am ĉiĉiĉi pe lon (mi renkontis Johanon).*]

**pe-**. Pref. Vd. p. 75 (NP 9).

**ples ...-u** = bonvolu ...-i.

**pre.** Prep., kiu estas la malo de „post”.

**senk/i** = mallevi.

**sic.** Prep. montranta an dawro aw an periodo inter du punktoj.

**soke/o** = sxtrumpeto.

**su.** Prep. montranta an surmetita vesto; = vestita it. Ekz.: *Li mangxis (ne) su piyamo. Li ambis (ne) su sokeoj. Li (ne) estas su mantelo / su cxapelo.* Noĝo 1: Oni povas uzi „sen” anstataŭ „ne su”. Noĝo 2: Estas evidente, ke la piyamo estas sur la korpo, sokeoj sur piedoj, cxapelo sur kapo.

**tes.** Prep. montranta an la posedo.

**to.** Vd. „jo ... to”.

**tras.** Signifas: de unu flanko al opoza flanko.

**tu.** Prep. Vd. p. 84 (NP 10).

**-uk/o.** Suf. montranta an kastrita animalo (p. 54). Ekz.: *kokuko* = kapono.

**-un/o.** Suf. montranta an masklo (p. 54).

**ut.** Prep. montranta an konsisto. Noĝo: gxi estas el Germaneza „aus” kaj Angleza „out

of”. Ekz.: *La libro konsistas ut du tomoj. Statuo ut bronzo. Piyamo ut flanelo. Mi ricevis an bukedo ut rozoj. Mi plenigis an la botelo ut vitro it akvo el krano per taso.*

**va.** Prep. Vd. „ak” k „av”, kaj p. 75 (NP 9).

**vestr/o** = okcidento, uesto, westo.

**zu.** Prep. montranta an rezulto.

[Red.: *Jen la alfabeto (propono) de R. Stahl:* cx [ĉ], gx (aŭ q) [ĝ], hx [ĥ], i [ĵ], sx [ŝ], w [ŭ], y [ĵ].]

[Red.: *Kp. i.a. kun la proponoj de Makkink en sia libro La Fundamento sub lupo, Antverpeno 1990:* na anstataŭ -n, za = loko malantaŭ, from = for de, tu = posedo de (p. 120). Ekz.: *Mi parolas pri la forpelado na la hundo far mi from la manĝajo tu ĝi (p. 94).*]

R. S. (US) (ric. inter 1996-08 kaj 1998-02)

### La alfabeto de Neo

Neo estas tre zorge ellaborita esperantido de Arturo Alfandari 1, publikigita en 1961 en Bruselo. Ĝia alfabeto estas kiel la Esperanta krom: c [ĉ], j [ĝ], q aŭ kw [kŭ], sh [ŝ], w [ŭ], x aŭ ks [ks], kaj y [ĵ]. Ne ekzistas la sonoj [ĵ] kaj [ĥ], kaj anstataŭ la Esperanta c estas s (*sigar, sigareti*), c [ĉ] (*citadel, cirkonskribi*), sh (*shenso* = scienco, *shen* = sceno) aŭ ts (*tsar, tsetse*). Ekzistas kh kun la indiko, ke ĝi prononciĝas „kiel el la angla”, kaj elparolo de c kiel ts estas „akceptebla”.

Jen teksteto por havi ideon pri Neo: *Na Patro ki sar in Cel, siu ta nam santat. Venu ta regno. Siu fat ta vol, asben in Cel, as on Ter. Na shakida pan ne diu oje. E ne pardonu na debos, as nos pardonar na deberos. E no ne induku in tentado, mo ne fridu da mal. Den tua sar Royado, poso e glor, po sem. Amen.* La nombroj: *un, du, tre, qar, qin, sit, sep, ot, non, is, 100 ek, 1000 mil.* La pronomoj: *mi, tu, il, el, it, nos, vu, zi,* krome *so* = si, *zef* = ili (nur inoj, „iŝi”).

### Recenzo: Ĝenita ...

... mi estas pri la libro *Konciza Gramatiko de Volapuko / Gramat brefik Volapŭka* de André Cherpillod, Courgenard (FR) 1995. Ĉar tio ne estas Volapuko. Jam la titolotraduko estas malĝusta kaj devas teksti *Glamat blefik Volapŭka*. Kaj fakte: temas pri la **reformprojekto** de Nederlanda kuracisto, Dr. Arie de Jong, do pri volapukido, pri Volapŭk nulik, Nov-Volapuko aŭ Volapŭk II.

Danĝera aspektas al mi la lasta alineo de la Ĉerpiljoda antaŭparolo: „*De longe, la esperantistoj ne plu konsideras Volapukon kiel rivalon, sed kiel respektatan praulon. Jen do, por la interlingvistoj, por la scivolemuloj, konciza gramatiko de la lingvo Volapük «nia dua lingvo, pük obsik telid», en la formo reformita de De Jong.*” Kion ni faru kun tiu volapukido? Ĉu ne plu interesa estas la vera Volapuko? Dum miaj prelegoj kaj kursetoj ĉe Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj mi ĉiam spertis grandan intereson pri la lingvo de Ŝlajer – sed kial ankoraŭ tiu ido de De Jong? Kion ni dirus, se fine de la 21-a jarcento – okaze de falo definitiva de Esperanto – iu publikigos Lingunon, Vikton, Hipersignon aŭ Unitarion kiel Esperanton? Pledas mi verve kaj vikle por la vera Volapuko!

Bedaŭrinde pluraj asertoj tiulibraj pri la originala Volapuko estas malĝustaj:

En Nov-Volapuko jen *bal* 1, *tel* 2, *deg* 10, *teldeg* 20. (p. 8) Kial De Jong ŝanĝis la ĉarman Volapukon sistemon, ke la dekoj estas la pluraloj de la unuoj, nome *bals* 10, *tels* 20, *kils* 30, *fols* 40 k.t.p.?

„*En Volapuko I, la numeraloj utilis ankaŭ por la tagnomoj kaj monatonomoj*: balüdel «*dimanĉo*», telüdel «*lund*o», kilüdel «*mart*do», ktp; balul «*januaro*», telul «*februaro*»..., balsul «*oktobro*», balsebalul «*novembro*», balsetulul «*decembro*».” (p. 9) **Ne!** En Volapuko („Volapuko I” ne ekzistas!) la tagnomoj estas *soldel, mundel, tusedel, vesdel, tödel, flidel, sädel*. Kial Ĉerpiljod inventis tiujn nomojn surbaze de la nombroj? Krome De Jong ŝanĝis la monatonomojn *apul* kaj *otul* al *prilul* kaj *tobul*. Kial?

„on «*ĝi*», oy «*oni*». [...] *En Volapuko II, ekzistas ankaŭ ĝentila formo, kaj en singularo, kaj en pluralo* [...] ors [...] [...] *Refleksiva pronomo* [...] ok «*si*», oks «*si (plurale)*» [...] [...] *En Volapuko I, neŭtro kaj reciproka pronomo ne ekzistis*: on signifis «*oni*» kaj ons signifis «*Vi (ĝentila formo)*».” (p. 10 k 11) **Ne!** En Volapuko ekzistas (ne „ekzistis!”) neŭtro kaj reciprokaj pronomoj: *os ĝi, ok si, oks si (plurale), om li, oms ili, on oni, ons vi (ĝentila)*.

„*En Volapuko I, oni havis kiom, kiof, anstataŭ kimik, kifik*.” (p. 13) **Ne!** *Kimik, kifik* kaj *kinik* egalas al nia *kiu*: por viroj, por virinoj kaj por neŭtraĵoj, dum en Volapuko ili estas

*kim*. La de Ĉerpiljod menciitaj *kiom* kaj *kiof* estas io alia, kaj krome li forgesis kelkajn: en Volapuko *kiom?* *kiu -o?* (en demandoj, por viroj), *kiof?* aŭ *ji-kiom?* *kiu -o?* (en demandoj, por virinoj), *kimik?* *kia -o?* (en demandoj, por viroj), *kiofik?* aŭ *ji-kimik?* *kia -o?* (en demandoj, por virinoj), *kiosik?* *kia -o?* (en demandoj, por neŭtraĵoj).

Golden kreis la nomon Goeresperanto por la esperantido Linguno: same oni povas nomi tiun ĉi volapukidon Jongapuko. Estas bedaŭrinda fakto, ke tiun idon la sinjoroj A. de Jong kaj A. Ĉerpiljod nomas Volapuko.

Claus J. GÜNKEL (DE) (ric. 1997-09)

### Studij vikte!

Aestimata Novistoj! Kum multa dankoj my akcipibat la Nr. 11. „Nova provo” periodikon. Ergo my legit: un author distingvit tiep du aedifikanta celojn, ekce: 1. reformi esperanton /aut/ 2. krei nova lingvon.

Okae, bravissimo! lu non mussit aperta portojn trarumpi: tia lingvo est la VIKTO. Ma la vikto non mon reformibat la esperanton, sed kaj perfektizibat lyn. Studij vikte!

Item tiep my legibat plura differenta alfabetojn cetera authorojs. Tiob my addit la sekreta runa-alfabeton mys, nome se aliu non komprendit vikte: studij tion!

[**Red.:** *Adreso k pluaj informoj: p. 74–75. Kelkaj vortoj: addi aldoni, akcipi ricevi, -bat -is, ekce jen, ergo do, item same, -iz- -ig-, -j -u, kaj ankaŭ, ly ĝi, ma sed, mon nur, mussi devi, non ne, -s (genitivo, ekz. mys de mi, cetera authorojs de ceteraj aŭtoroj), sed sed (post nea frazo), -t -as, tiep tie, tiob tial.*]

BÖSZ Vilmos (HU) (ric. 1997-08)

### Necesas kontrolteksto ...

... por povi facile kaj egale prijuĝi novajn alfabetoproponojn, ekz. Eĥoŝanĝo ĉiuĵaŭde. Ĉio senchava. (*La Gazeto* 76, p. 15) La ĉefia ĥoro nuanchave eĥanta hieraŭ en Liĥténŝtejno tuŝis niajn korojn ĝisfunde dum la Renkontiĝo Internacia de Eŭropaj kaj Aŭstraliaj Arĥitektoj en Aĥeno. Tiokaze la bufedon ornamis plej luksaj, ekscelantaj kaj eĥ ekzotaj manĝaĵoj ĵus alvenintaj kiel maizsalato, rizzebraĵo, ostsupo, grossaŭco, citronŝorbeto, spicherboj, plukherboj kaj rosherboj.

**Red.**

## Necesas difini ...

... la terminon „esperant(o)ido“. Antaŭ havi taŭgan difinon de tiu nocio, listo servu kiel difino. Ekde NP 13 kaj poste Interrete aperu kvazaŭoficiala listo pri esperantidoj. **Red.**

## Novo e UEA

Oni povun multe comenti pri la ĵisnuna historio de la rilato inter Novo e [kaj] Universala Esperanto-Asocio, sed scribante pri la temo nun lau peto de la NP-redactoro, mi provon nur tracti la factos. Comentos e alias reagos de la legantos estan tre bonvenas — aparte se ili atingan la consernas homos qe UEA.

En frua 1988 mi sendin al la tiama redactoro de la revuo *Esperanto*, Mark Fettes, articolo titolita “Ĉu eblas plibonigi la lingvon?”, en ciu mi scribin ce por ce tio eblu, neseson ce la prireformas interesatos atingu consenton inter si pri la deziratas modifos, e ce la interconsentita formo estu acseptita de la plimulto de la activas esperantistas. Conclude mi alvocin por la fondo de nova UEA-facasosio por la prova elaborado de nova fundamento de Esperanto. Fettes nolacseptin [malakceptis] la articolo, clariante ce UEA ocupizan [okupiĝas] nur pri practica aplicado de Esperanto, e ne pri tio a cio [kion] li nomis teorias discutos.

Nelonge post tio mi estin dungita ciel compostisto en la UEA-ofiseyo, vancam [kvankam] oni sabin [sciis] ce mi estan reformulo. Mi ne izin [iĝis] nolpli tia pro mia nova posteno, sed ade pensadin pri lingo-reforma facasosio e fine de 1990 elpensin nomo por ĵi, nollongigante mia termino *novfundamentismo* al, simple, *Novo*. En tiu sama tempo aperin anonso en *Esperanto* pri libro eldonota de Internacia Kultura Servo en Zagrebo, *Estonteco de Esperanto*, ciu lauatende enhavon la opinios de 500 esperantistas pri „bazaj kaŭzoj de la ĝisnuna malsukceso rilate la kvanton de Esperanto-uzantoj“, „ĝeneralaj cirkonstancoj en la 90-aj jaroj kiel bazo por la estonteco“, e „strategio kaj esencaj agadkampoj en la 21-a jarcento por penetrigi Esperanton kiel 2-an lingvon de ĉiuj Teranoj“. Tiu anonso instigin mi denove verci articolo, e vancam la libro ne aperin, pro manco de contribuantos, mi restin cun

pli definitiva envortigo de mia conserto e cun plia emo comunici ĵi al alias homos.

La ocazo venin post nelonge en 1991, ciam mi compostin la marta numero de *Esperanto*. Estin iomete da libera spaso en la rubrico de anonsetos, a ciu mi plenigin per la eta mesajo: „Reformemuloj! Skribu al Novo, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam.“ Tiu anonseto, same ciel qiu posta, estin pagita lau la normala UEA-tarifo de unu guldeno por qiu vorto.

Tiu unua anonseto yam risevin celcas respondos, e secvin similas anonsetos en la aprila, junio, e juli-augusta numeros („Se vi ŝatus partopreni en plurjara projekto de komuna lingvoreformo“). En agosto aperin la unua numero de *Nova Provo*, cun cvar contribuantos de la unuas respondintos, en la ducolumna formato proponita en la zagreba articolo (reformversio unufance, normala Esperanto alifance). Pluas anonsetos en *Esperanto* (cun parolo pri facasosio anstate projecto) aperin en septembro e octobro 1991, mayo e decembro 1992, e februaro 1993. En tiu sama tempo aperin NP 2 (marto 1992), 3 (julio 1992), e 4 (februaro 1993). En numero 3 anonsezin [anonciĝis] la starigo de Novo-conto qe UEA, e en numero 4 aperin la rezultos de la unua vozdono, cun la informo ce nur 1 el la 21 partoprenintos contrin la propono ce Novo laueble farizu alizinta au cunlaboranta asosio qe UEA (17 subtenin, 3 sindetenin).

Malgre [malgraŭ] la evidente tre amica sinteno de Novo e la novistos al UEA, qi ties Estraro vozdoin [voĉdonis] en sia cunsido de februaro 1993 nolpermesi iu ayn mensio pri Novo en la eldonazos [eldonaĵoj] de UEA, eq en pagita anonso. Ĵi venin al tiu desido sen la pley eta consulto cun mi, vancam mi estin tiam en la apuda qambro e complete ye ilia dispono por interparolo.

Tiu cenzuro bedarinde [bedaŭrinde] ne estin la fino de la agado contre Novo en tiu yaro. La tiama generala secretario de UEA, Ian Jackson, obstinin ye sia contrareformista propono pri lingopolitico, tiel devigante ce mi sendu protesto al la tuta Comitato, e ce novistos simile protestu al sias respectivas comitatanos (vidu NP 5, ciu estin complete dediĝita al tiu temo).

Felise [*Feliĉe*] ni vencin pri la lingopolitica propono de Jackson (ciu reprenin ji fronte al la protestos), sed la cenzuro ancore [*ankoraŭ*] restin, e restan ancore nun. La pasinta UEA-estrarano pri lingopolitico, Amri Wandel, promesin reconsidero dum la aprila estrarcunsido de aprilo 1997, sed la demando estin nur pludonita al trihoma komisiono por posta discuto pere de Interreto. Tiu diskuto ne efectivizin malgre ripetitas provos mias, e fine aspectin ce la komisiono estin nur convena rimedo por procrasto e neniofaro.

Mi esperan ce ni novistos plu campanyon por la rayto je propra facasocio ene de UEA, sed ni ne faru tio cun vanas atendos pri akseptema sinteno qe ties estros.

[Red.: c [k], i [ĝ], q [ĉ], y [j], -an/-in/-on/-un = -as/-is/-os/-us, -as/-os = -a(n)/-o(j)(n). Same en liaj tekstoj sur p. 72 (NP8) k p. 93-96 (NP 11).]

Roy McCOY (NL) (ric. 1997-10)

## Enketo I

Jen enketo pri ŝanĝoj al Esperanto aŭ/kaj pri nova planlingvo.

① Ĉu la personaj pronomoj tro similas unu al la alia pro la ĉiama fina -i - ĉefe okaze de *mi* kaj *vi*, de *mi* kaj *ni*, de *ni* kaj *vi*? Jen kelkaj proponoj:

- de Prof. H. Frank: *mi* → *moj*, *vi* → *vuj*.
- *mi* → *me*, *vi* → *vu*, *li* → *le*.
- *vi* → *vu*, *ni* → *no*, *li* → *le*.

(Atentu, ke ekzemple ne eblas *si* → *se*, ĉar ĝia akuzativa formo estus *sen*.)

Ĉu realigi la ideon, ke, pro pli bona distingo, ĉiu persona pronomo havu propran vokalon, ekz. *mi*, *vu*, *le*, *ŝa*, *ĝo* aŭ *me*, *vu*, *lo*, *ŝa*, *ĝi*?

② Ĉu *sc-* estas sufiĉe ĝena? Ĉu en maloftaj vortoj kiel *scienco*, *sceptro* kaj *sciuro* ĝi po-vas resti, sed ne en la ofta *scii*? Kio pri *scii* → *nosi*, *sabi* aŭ *saji*? Aŭ *se* → *if* kaj *scii* → *sei*? Ĉu same *eksciti* → *esciti*, *ekskludi* → *eskludi*, *ekskurso* → *eskurso* k.s.?

③ Ĉu pro la ĝena simileco inter *junio* kaj *julio* estu *junio* → *ĵuno* laŭ angla *June* [ĝ-], franca *juin* [j-], portugala *Junho* [j-], kaj itala *giugno* [ĝ-]? (Komparu kun la germana, kie oni uzas la formojn *Juno* kaj *Julaj* okaze de miskomprenblo de *Juni* kaj *Juli*.)

④ Ĉu *tre* tiom similas al *ne* kaj al *tro*, ke ĝi estu ŝanĝita, ekz. al *muj*?

⑤ *Ne* kaj *jes* havas la saman vokalon: ĉu tio ĝenas? Alialingve ne estas tio: *jes* - *noŭ*, *ŭi* - *no*, *ja* - *najn*, *si* - *no*, *ken* - *lo*, *ne* - *ofii*, *ja* - *ne*, *tajp* - *ne*, *da* - *ne*, *evet* - *hajir*. Ĉu eble jam *nen* / *jes* kun la finaj *n* kaj *s* estas sufiĉe kontrastaj? Aŭ ĉu oni prenu la internacian *no*: *nen* → *no*? Aŭ eĉ: *ne* → *no* ĉiuokaze?

⑥ Ĉar *ses* kaj *sep* tro similas, jam estis proponita la varianto *sis*. Same similas *kvar* kaj *kvin*, ĉar ambaŭ komenciĝas je kv-. Ĉu *kvin* → *pem* aŭ *fem*? (Komparu kun la germana lingvo, kie oni uzas la formon [cvo] anstataŭ [cva]) okaze de miskomprenblo de [cva] (= *du*) kaj [draj] (= *tri*.)

⑦ La pluralo: -j aŭ -s aŭ io alia?

⑧ Substantivoj/adjektivoj: ĉu -o/-a aŭ inverse -a/-o, -o/-e, -e/-a, aŭ io alia?

⑨ Infinitivoj/adverboj: ĉu -i/-e, -e/-i, -i/-el, -er/-ement, aŭ io alia?

⑩ Ĉu rapide legante oni facile konfuzas pri la frazkomencaj vortoj *se* kaj *sed*? Kiel solvi? (Atentu, ke la ofte proponita *ma* ja estas sufiĉe internacia, sed malpli redunda ol *sed*, krome kun la ofta artikolo estiĝas *ma la*, kiu tro similas al *mala*.) Ĉu estas danĝero konfuzi pri *se* kaj *sen*? Ĉu pri *ĉu* kaj *ĉiu*? Ĉu pri *kaj*, *ke* kaj *kia*?

Kiu(j)n el tiuj ĉi punktoj vi opinias nemenciindaj kaj neproblemaj? Kiel vi argumentas ĉi tie rilate internaciecon, bonsonecon kaj klaran distingeblon? **Red.**

## Enketo II

*Se estos enketo pri helpalfabeto por Esperanto, ĉu vi estos preta voĉdoni pri tiuj ĉi punktoj?*

- (1) Ĉu vi jesas al *ch* [ĉ], *sh* [ŝ], *y* [j]?
- (2) Ĉu vi jesas al *hh* aŭ al *kh* por [ĥ]?
- (3) Ĉu vi jesas al *u*, al *w* aŭ al *uw* por [ŭ]?
- (4) Ĉu vi jesas al *gh/j*, al *gh/zh*, al *dj/ĵ*, al *j/zh*, al *gh/jh*, al *j/jh* aŭ al *gi/ĵi* por la paro [ĝ/ĵ]?

**Red.**

## **Propono de statuto de Novo**

*Bonvolu tralegi sur la venontaj paĝoj la proponon de statuto por la asocio Novo, nun oficiale fondota:*

### **(1) Nomo kaj sidejo**

(1.1) La asocio havas la nomon Novo, kaj plie difiniĝas kiel „asocio por la komuna elaborado de lingvo internacia”.

(1.2) La sidejo de la asocio estas ĉe la loĝloko de la prezidanto.

### **(2) Lingvoj**

(2.1) La oficiala lingvo de la asocio estas la lingvo Esperanto, kiel difinita de ties Fundamento.

(2.2) Anoj kaj oficistoj de la asocio rajtas uzi ankaŭ aliajn lingvojn kaj lingvoprojektojn laŭbezone kaj laŭdeziro.

### **(3) Celoj kaj agadoprincipoj**

(3.1) La asocio bazas sian agadon sur la premiso, ke neŭtrala, planita, konstruita lingvo estas la solvo de la monda lingvoproblemo.

(3.2) La asocio celas:

(3.2.1) ellabori eventualan estontecon de Esperanto, speciale rilate al la „aŭtoritata komitato interkonsente elektita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj” menciita en la dua frazo de la Fundamenta Antaŭparolo;

(3.2.2) diskuti kaj esplori specialajn paralelajn formojn en Esperanto, okupiĝante interalie pri faklingvaĵoj, pli facila elparolo, kaj pli bona kompreniĝo per telekomunikiloj;

(3.2.3) diskuti kaj esplori la principojn kaj taŭgecon de la Esperanta vortelekto, kaj prijuĝi la konflikton inter respekto al la tradicio kaj nuna lingvouzo unuflanke, kaj la indo aŭ neceso de ŝanĝoj aliflanke;

(3.2.4) informiĝi kaj informi pri la stato de aliaj planlingvoprojektoj, kaj pri la diskutoj inter ili;

(3.2.5) kunlabori kun samcelaj kaj similcelaj asocioj;

(3.2.6) diskuti kaj esplori la gravajn aktualaĵajn problemojn de Esperanto kaj planlingvoprojektoj, ekzemple kun rilato al:

- la sonoj (precipe la malplej oftaj en Esperanto);
- sendiakrita alfabeto;
- nevirocentra lingvouzo (precipe rilate al finaĵoj kaj pronomoj);
- akuzativo;
- akordo de adjektivoj kaj substantivoj;
- plŭralo ĉe substantivoj, adjektivoj kaj verboj;
- transitiveco kaj netransitiveco de verboj;
- la skemismo de bazaj pronomoj, subjunkcioj, konjunkcioj kaj tabelvortoj; kaj
- latinideco kaj eŭropeco;

(3.2.7) esplori la pasintajn spertojn rilate al planlingvoprojektoj, al iliaj idoj, kaj precipe al idoj de Esperanto;

(3.2.8) enketi la ĉi-rilatan opinion ĉe planlingvoprojektanoj, lingvoaŭtoroj, esperantistoj kaj eksteraferanoj, kaj informi pri la rezultoj; kaj

(3.2.9) kontribui al la ellaborado de strategio por atingi oficialan akceptitecon de neŭtrala, planita, konstruita lingvo kiel solvon de la monda lingvoproblemo.

### **(4) Kunlaboro, registriĝo kaj publikutileco**

Pri la kunlaboro kun aliaj asocioj, pri aliĝo, ligo kaj kuniĝo al aliaj asocioj, pri registriĝo ĉe juĝejo de ŝtato kaj pri la demando de publikutileco ĉe ŝtato decidus la membrokunveno.

### **(5) Administra jaro**

La administra jaro estas la kalendara.

### **(6) Membreco**

(6.1) Ĉiu individuo agnoskanta tiun ĉi statuton povas membriĝi en la asocio per skriba deklaro sendita al la sidejo.

(6.2) La estraro decidus pri eventualaj malakceptoj aŭ eksmembriĝoj.

(6.3) Ĉiu membro devas defendi la principojn de la asocio, aktive se okazo por tio sin prezentas.

(6.4) Ĉiu membro devas pagi la membrokotizon pridedicitan de la estraro.

(6.5) La membroj estas kolektive suverenaj pri la gvidado de la asocio.

(6.6) La membreco finiĝas per:

(6.6.1) morto,

(6.6.2) deklaro pri eksmembriĝo, aŭ

(6.6.3) eksmembriĝo per decido de la estraro.

### **(7) La asociaj instancoj**

La asociaj instancoj estas la membrokunveno kaj la estraro.

### **(8) La membrokunveno**

(8.1) La membrokunveno estas kunvokenda de la estraro

(8.1.1) kutime ĉiun trian jaron aŭ

(8.1.2) laŭ postulo de kvarono de la membroj.

(8.2) La membrokunveno rajtas decidi nur se ĝi estis kunvokita almenaŭ tri monatojn antaŭ la kunvenodato kun indikoj pri ĝiaj loko, dato, horo kaj provizora tagordo.

(8.3) La membrokunveno decidas per relativa plimulto de la ĉeestantoj kaj anstataŭatoj.

(8.4) Okaze de statutomodifo aŭ malfondo, la membrokunveno decidas per plimulto de tri kvaronoj.

(8.5) Ĉeestantoj rajtas voĉdoni nome de neĉeestanta membro baze de skriba komisiio.

(8.6) Tuj kiam eblos, la membrokunveno fariĝos konstanta kaj regula pere de internacia komputila reto.

### **(9) La estraro**

(9.1) La estraro konsistas el almenaŭ du personoj, kiuj estas la prezidanto kaj la kasisto.

(9.2) La estraron elektas membrokunveno. La estraro respondecas antaŭ la membrokunveno.

(9.3) La membrokunveno elektas almenaŭ ĉiun trian jaron estraron.

(9.4) Ĉiuj oficoj de la asocio estas sensajlajraj. Elspezoj faritaj de la estraranoj estas

kompensataj nur kadre de la decidoj de la membrokunveno kaj de la tuta estraro.

### **(10) Membrokotizo**

Pri la sumo de la membrokotizo decidas la estraro.

### **(11) Malfondo**

(11.1) Pri malfondo povas decidi nur membrokunveno per plimulto de tri kvaronoj.

(11.2) Okaze de malfondo, la estraranoj estas la likvidantoj.

### **(12) Transira klaŭzo**

Inter la fondo de la asocio kaj la unua laŭstatuta membrokunveno, la asocio estos gvidata de estraro elektita de la fondintoj.

Günkel/McCoy (DE/NL) (ric. 1997-09)

## **Pri ni: al la „aŭtoritata komitato“**

Artikolo (3.2.1) de la statutopropono ĉi tie supre parolas pri la t.n. „aŭtoritata komitato“ menciita en la Fundamento. Unu el la taskoj de Novo povas esti prepari proponon al tiu Fundamento-konforma komitato en formo de rezolucio. Jen ia ŝablona ekzemplo:

**Ni**, la anoj de Novo,

**proponas** al la aŭtoritata komitato difinita de la Antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto

**ŝanĝi** la Fundamentan alfabeton de Esperanto al tiu ĉi alfabeto [...],

**ĉar** ni opinias ĝin pli internacia kaj pli adekvata, i.a. rilate al la telekomunikiloj;

**ŝanĝi** la Fundamentajn personajn pronomojn [...] al [...],

**ĉar** [...];

**ŝanĝi** la Fundamentajn kaj oficialajn radikojn [...] al [...],

**ĉar** [...];

**enkonduki** [...],

**ĉar** [...].

**Red.**

Bonvolu memori, ke tiu ĉi numero NP 12 estas definitive la antaŭlasta en presita formo!